

# **Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo lundon la 22-an de oktobro 2018 per Skype.**

(Protokolo aprobita la 19-an de novembro 2018)

## **Partoprenis:**

Anne Karin Bondhus en Bryne  
Ulf Lunde en Os ekde punkto 3.  
Mario Machlik en Tromsø  
Amelie Matt en Tromsø  
Lars Sandbakk en Sandnes

## **0. Tagordo**

Aprobita.

## **1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 27-an de aŭgusto**

Aprobita.

## **2. Ekonomio**

La kasisto raportis pri la ekonomio: Skagen Vekst kr 59 011,- (63 766,-)  
Skagen Høyrente kr 133 487,- (133 321,-)

## **3. Jarraporto, jarkalkulo 2017**

Bedaŭrinde pro malsaniĝo Anne Karin ne povis finfari la jarkalkulon. Ankaŭ en la jarraporto ni havas kelkajn partojn kiujn ni devas kompletigi. Ulf promesis skribi kaj demandi la oficejon pri mankantaj informoj. Ni devus fini la laboron dum la venonta interkonsiliĝo, ke la jarkalkulo kaj la jarraporto povu aperi en la lasta ĉijara numero de Norvega Esperantisto.

## **4. Arĥivado de dokumentoj de Støp-Bowitz**

Ingebjørg Rambjør kontaktis la estraron la 5-an de septembro ĉar ŝi havas dokumentojn de Støp-Bowitz kiun ŝi ŝatus fordoni por arĥivado. Ni konsilos al Ingebjørg sendi ĉion al la oficejo kaj poste ni vidos, ĉu ni plusendos la dokumentojn al la Nacia Arĥivo, al la Nacia Biblioteko aŭ ni konservos ilin en nia propra arĥivo.

## **5. Datoj por la venontaj estraraj interkonsiliĝoj**

Venontfoje ni interkonsiliĝos lunde, la 19-an de novembro. Pri aliaj datoj ni ne parolis.

## **6. Eventualaĵoj**

**A.** Klubo en Bryne sendis peton al *Brønnøysund-registeret* por havi propran organizan numeron. La klubo de Stavanger pritaksas aliĝi al klubo de Bryne kaj tiam ili povus uzi la saman organizan numeron kaj bank-konton.

**B.** La kasisto de NEL havis problemon ricevi retmesaĝojn de la oficejo pro mankanta « SPF » de nia domeno « esperanto.no ». Ŝi kontaktis Judith P. Abrahamsen pri tiu problemo.

La interkonsiliĝo daŭris 20:00 - 21:00

La venonta interkonsiliĝo okazos la 19-an de novembro 2018.

Raportis Mario Machlik